Omtrent de activiteit van Sennacieca-Asocio-Tutmonda is weinig bekend. Het is een organisatie, die zich ten doel stelt vriendschappelijke betrekkingen te onderhouden tussen alle wereldburgers, zonder onderscheid te maken tussen ras-politiek, geloof of nationaliteit.

Haar leden bestaan uitsluitend uit esperantisten. Van 2 Augustus tot 7 Aug '47 wordt door de S.A.T. een congres gehouden te Aarhus in Denemarken.

Uitgetrokken door KdJ Afd./Sectie ACD 4 Datum 16-10-'47

INLICHTINGDIENST.

ROTTERDAM.

I.D. No.717.

GEHEIM.

(K)

| |
|-------------|
| Volgno. ✓ |
| 23 JUL 1947 |
| ACD/19534 |

Uitvoerdienst

Rotterdam, 21 Juli 1947

NUMMER B

| | |
|---------|---------|
| Nummer: | |
| Datum: | 24-7-47 |

In antwoord op Uw schrijven No. BX 18010, d.d. 10 Juli 1947, betreffende "Sennaculo", wordt het volgende bericht:

"Sennaciulo" is het officiële orgaan van de vereniging Sennacieca Asocio Tutmonda, welke vereniging gevestigd is: 67 Avenue Gambette, Parijs 20.

Omtrent de Sennacieca Asocio Tutmonda wordt nog verwezen naar het dezerzijds schrijven I.D. No. 614, d.d. 21 Juli 1947, in antwoord op Uw schrijven No. B 16700, d.d. 4 Juni 1947.

Als uitgever van het blad treedt op Van Essen, Cornelis, geboren 3-8-1909 te Loosduinen, kantoorbediende, wonende te Rotterdam, Floretstraat No. 10.

van Essen, C., was vroeger S.D.A.P.er, doch is tegenwoordig communistisch georiënteerd. Hij is tevens secretaris van het district Rotterdam van de Bond van Arbeiders Esperantisten.

Als redacteuren treden op: 1. L. Bannier, nadere personalia onbekend. Correspondentie voor hem moet worden gericht aan het kantoor van de S.A.T. op bovengenoemd adres te Parijs. 2. Wels, Bastiaan Pieter, geboren 30-4-1897 te Rotterdam, los werkman, wonende te Rotterdam, le Wandeloorddwarsstraat No. 33.

Laatstgenoemde is sociaal-democratisch georiënteerd en zal vermoedelijk lid zijn van de Partij van de Arbeid.

Het orgaan "Sennaciulo" wordt aan alle leden van de S.A.T. toegezonden, doch is in Rusland verboden.

Het blad verschijnt maandelijks en een exemplaar van de maand Juli wordt te Uwer oriëntatie hierbij toegezonden.

Verzonden aan: Hoofd Centrale Veiligheidsdienst, Javastraat 68 te 's-Gravenhage.

19535 X
oo

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrujo:

67 avenue Gambette, Paris 20
Redaktoroj: L. Bannier ĉe
S.A.T., Parizo kaj Bas Wels
la Wandeloorddwarstraat 33
Rotterdam.

Eldonejo de SENNACIULO:
C. van Essen
Floretstraat 10, Rotterdam-Z.

RAPORTO DE LA PLENUM-KOMITATO DE S.A.T.

ENKONDUKO

La partoprenintoj de la Kopenhaga Kongreso (aŭgusto 1939) estis apenaŭ rehejmigitaj, kiam eksplodis la dua buĉado tutmonda. Sekve, ne plu eblis plenumi la taskojn planitajn dum tiu Kongreso. ĉe ni ne plu havis la necesan liberon, pro la milit-stato, publikigi en Paris niajn du organojn: Sennaciulo k Sennacieca Revuo. Unu Plenum-Komitato (K-do Baro) soldatiĝis; alia (K-do Bartelmes, redaktoro) pro lia germana origino, estis internigata.

Antaŭ tiu situacio en Paris, K-do Bas Wels, C. v. Essen k aliaj Rotterdamaj SATanoj tuj konsentis prizorgi la administradon de la Asocio k la daŭrigon de S-ULO; aperis tiel sep numeroj, presitaj en Bruselo, poste en Hago, ĝis majo 1940, kiam la Hitleraj armeoj storme invadis Nederlandon k Belgion. (pri tiu periodo vidi ankaŭ la rubrikon Sennaciulo).

Pro eventuala sieĝo k bombardado de Paris, la P.K. estis savita la havajdon de la Asocio. Ĝi tamen ne sukcesis transporti foren ĉion, kion ĝi deziris ĉirkaŭ kontraŭ la detruado aŭ konfisko.

Plie la firmo kie laboris Kdo Bannier migris, junio 1940 al Lyon, kie li restis ĝis septembro 1942; li kunportis la plej gravajn k konservindajn arkivojn. — Restis do en Paris nur du PKanoj, Kdoj Avid k Glodo (Piron forestis dum pluraj semajnoj), k kelkaj SATanoj, kiuj, spite la danĝeron, preferis ne forlasi la metro-polon.

Fakte, kontraŭe al ĉies opinio, Parizo estis nek bombardita nek sieĝita; tamen profunde mallumaj k deprimaj estis la tagoj, kiuj sekvis la eniron de germanaj soldatoj en la urbo; dezertiĝis ĝiaj stratoj; kirliĝis la cerboj, untuj apatie, aliaj tumulte.

Nu, en septembro 1940, K-do Mejer ricevis unu mendon de libroj; tiu faktoro renaskis esperon ĉe li k, helpate de Kdoj k Piron, li malfermis la sidejon k tie deĵoris ĉiusabate por akcepti la Kdojn kiuj, malgraŭ ĉio, deziris praktiki nian lingvon.

De sabato al sabato pliiĝis la nombro de vizitantoj ĉe la „salono de Sinjorino Desat“....., tiel estis bapte nomita la oficejo de SAT, en la korespondado, por eviti la scirolemon de germanaj k francaj ĝenantoj. Cirkulero informis la Kdojn en

la pariza regiono. Krom malnovaj SATanoj venis ankaŭ entuziasmaj junuloj ne infektitaj de la nacieca propagando; kelkaj el ili fariĝis la plej viglaj aktivuloj de nia movado. Oni instruis esperanton en kluboj de junulargastejoj kies membroj ne submetiĝis al la tiamaj mastroj. Oni interŝanĝis informojn pri la internigitoj k pri la militkaptitoj; oni parolis pri estonto, pri paco; tie oni sin sentis hejme for de la furiozanta militismo, kvazaŭ en edeno. Fojon tamen, aŭtune 1943, ni juĝis prudenta resti for de la ejo dum unu monato, ĉar du el niaj junaj Kdoj estis arestitaj. Ili estis ekzilitaj al koncentrejo en Germanio; la afero ne havis sekvojn por ni, tamen malkvietiga estis la alarmo.

Komence de 1943 ni dissendis komunajn Leterojn (2-paĝoj) al ĉiuj francaj SATanoj k al kelkaj en Belgio. Aperis sep leteroj. Relegante hodiaŭ la kolekton ni miras pri nia tiama aŭdaco, ĉar ja ni tie skribis pli ol sufiĉis por tiri la atenton de la Gestapo germana aŭ franca; multaj personoj konis koncentrejojn, kiuj malpli kritikis la militismon ol ni en tiuj Leteroj.

Post la „liberigo“ de Paris, ni publikigis la Bultenon de SAT-Amikaro, ĉiumonate ĝis kiam, januare 1946, Kdo Bas Wels reprenis la redakcion k trovis la kvanton de papero necesa, por presigi S-ulon; la unua numero portis la titolon „Bulteno de SAT“, poste „Kosmopolito“. (De tiam la Bulteno de SAT-Amikaro refariĝis la organo de la franclingvia LEA, nomita SAT-Amikaro).

En januaro 1945, la pariza SATanaro renormaligis jene la konsiston de la P.K.: malnovaj anoj, Kdoj Banie, Glodo, Piron, — novaj anoj, Kdoj Andreo, Dazun, Mejer; Ĝi tuj dissendis Manifeston al ĉiuj landoj poŝte trafeflaj, por sciigi ke SAT transvivis la militon k pretas reaktiviti.

Diversaj estis la ejoj al tiu Manifesto; la granda plimulto el la membroj aprobis ĝin; kelkaj, kiuj ankoraŭ doloris pro la freŝaj perfortoĵoj de la naziistoj, malfavore kritikis ĝian formon; pluraj miris ke SAT ne ŝanĝis sian idealon kiu, laŭ ili, ne plu estis aktuala.

Male ni pensas ke la milito k ankoraŭ pli ties sekvoj pravigas la originalan idealon de SAT. Ni restas konvinkitaj ke la

grandaj problemoj kiuj perturbas la Homaron, estas solveblaj nur per la sennacieca kulturo k strukturo proponataj k praktikataj de S.A.T. Ne evitebla la tria mondmilito (ne aboleblaj la soci-klasoj, ĝis kiam la Socio ne staros sur sennacieca bazo).

Certe en tiu epoko, kiam vundoj estis ankoraŭ malfermaj, kiam dum sep jaroj silentis la voĉo de SAT, estis ne facile redakti manifeston kiu trafus ĉies aprobon. Mondmilito ne nur detruas fizike sed ankaŭ moralaj fortoj penege akiritaj, tendencas droni en la ŝtormego. Ĉu pro tio sendi banalan komunikon sensukan, senidean, kiu vekus nenian esperon ĉe la malkuraĝigitaj K-doĵ?

La nepra devo de la P.K. estis fari firmam alvokon por daŭrigo de la SAT-laboro, alvokon spegulantan la idearon, kiun tiu P.K. devis varti laŭ la deĵoro de la lastaj kongresoj. Nur alvoko tia estis akceptebla, pro ĝia sennacieca formo, de ĉiuj esperantistaj proletoj, kiam ajn naciecon la sorto estu doninta al ili.

Kvankam la naciismo estas ĉie pli akuta ol iam ajn, la idealo de SAT „krei ĉe siaj membroj eksternacian sent pens - k agad - kapablon“, trovas pli favoran akcepton ĉe la esperantistoj. Ĉie, depost tiu ĉi milito, la mondismo progresas ĉe ĉe la regantaj medioj.

Ekde oktobro-novembro 1944 ni do rekontakitis kun la „ekstero“: Belgio-Britio-Ameriko; kun Nederlando nur en 1945. Tiam, k ankoraŭ nun, la vojo estas riĉa je dornoj k baroj; tiuj, kiuj inter ni, depost 27 jaroj, postenas ĉe SAT, asertas ke la funkciado de universala asocio estas nun tute alia ol antaŭ 1939: multe pli peza, nekompareble pli komplika ol la administrado de „nacia“ organizo, kies merkato k klientaro estas kompakta, homogena, mallarĝa, facile trafefla. Sekve de la milito ĉio, sur la skalo tutmonda, estas haosa, k tiu stato reefikas sur la funkciadon de nia Asocio.

En nia laboro ni renkontas malfacilojn el diversaj specoj; ni resumu ilin:

— internacia poŝta-trafiko ne ankoraŭ normala; malrapida (2 monatoj el Argentino) necerta k multekosta; ankoraŭ rompita kun Hispanio, Japanio k Sovetio;

SUPER LA DETRUENDAJ LANDLIMOJ S. A. T. FLIRTIGAS SIAN STANDARDON

„kontrabandista“ korespondado kun Germanio; persista severo de la cenzuro (Germanio, Aŭstrio, Polio, Bulgario ktp.) kiu kelkfoje retrosendas aŭ konfiskas la leterojn; leteroj k pakoj perdiĝas, precipe la gazetoj sub banderoloj, en proporcio ne kompareble pli alta ol en 1939.

— arkaika dogano, kies regularo estas tiom rigida k konfuza ke fakte ne eblas eksporti aŭ importi pli ol du libroj samtempe sen kolizii kun la dogano; tiu mezepoka servo regas en ĉiuj landoj, en Francio kiel en Ĉekoslovakio, en Nederlando kiel en Britio; foje la pakajo kuŝas plurajn semajnojn ĉe la doganejo, k kiam fine la varo estas liverata, la sinsekvaj esploroj k manipuloj difektis la librojn. Ni havas en Stokholmo stokon da SAT-libroj relativa gravan, sed ni hezitas pri ties ekspedo al Paris, ĉar ni timas la intervenon de la dogano, kiu postulus altan imposton. Kaj la Bruselo de „Leteroj de Lanti“ ni venigas el Bruselo nur guton post guton.

— kapitalon ni havas en deko da diversaj landoj, sed la post-militaj ediktoj pri la movado de la devizoj estas tiaj, ke praktike ne eblas ĝiri tiun monon nek al Parizo, nek al Roterdamo. Ni konfesu tamen ke pluraj landaj perantoj sukcesis en siaj lertaj klopodoj, plej ofte per rimedoj ne tre ortodoksaj. Certe ni povas eluzi surloke la akumuligintan kapitalon; tion ni jam faris, sed tio devigas nin al mendo, kiu ne respondas ĉiam al nepra neceso.

— tiu ĉi lasta malfacilo komplikas terure la tenadon de la kontoj. Ekzemple: la Dana LEA deziris pagi al SAT; nu, ĝi donis la monon al la Dana neŭtrala Ligo, kiu havis krediton ĉe la neŭtrala Nederlanda Asocio, k tiu ĉi pagis al nia peranto en Rot. — Argentinio sendis ĉekon al nia svisia peranto, k tiu ĉi ĝiris al SAT, Paris. Kaj ĉe ĉiu etapo de la pagado, ni devas konverti la sumon en la monon de la lando; okazas ne malofte ke ĝirinto kalkulas laŭ kurzo tute alia ol nia. Ĉekoj el Meksikio en funtoj anglaj, ĉe nederlanda banko, — el Argentinio en svisiaj frankoj ktp..... Kaj ne ĉiam la Roterdama aŭ Pariza banko lasas al ni la monon; ĝi postulas..... paperon kiun ni ne havas; ni ne hontas krei ĝin artifice, sed la procedo foje fiaskas, k tiam la ĉeko estas resendata al la fonto, por plua enketo. Nu, sufiĉas, vi jam komprenis en kio ni baraktas!

Pro tio ne eblas ke ni prezentu bodiaŭ ekzaktan bilancon. En aprilo ni sendis cirkuleron al niaj perantoj k al kelkaj klientoj por kompari iliajn ciferojn kun niaj. Nur post tiu komparo ni konos precize nian aktivan. — Dume ni sciigu ke la spezoj en Paris estas periode kontrolataj de du aŭ tri parizaj SATanoj (ekster la P.K.) kiuj ĝis nun trovis ĉion en ordo.

P.K. de S.A.T.

Raporto pri la agado de la Roterdama Komitato 1939 - 1940

Kiam en septembro 1939 eksplodis la 2a mondmilito kaj la agado de la P.K. en Parizo ne plu estis ebla, kelkaj k-doĵ en Roterdam turnis sin al Parizo kun la propono

transpreni provizore la taskon de la P.K. Kvankam ni sciis, ke ankaŭ al Nederlando la milita danĝero minacas, ni tamen ne sciis pli bonan solvon, konsciante, ke la danĝero estis same granda por ĉiuj eŭropaj landoj!

El tiu iniciato rezultis, ke en Roterdam fondiĝis provizora komitato konsistanta el la k-doĵ B. Wels, C. van Essen kaj A. v. d. Pols, kies unua tasko estis informi la membrojn kaj mem akiri la necesajn informojn por kiom eble plej baldaŭ ripari la rompitan kontakton. Tiucele ni sendis al ĉiuj konataj adresoj cirkuleron kun la peto informi nin kaj en oktobro aperis la lasta numero de S-ulo, eldonita de la Parizaj k-doĵ, kiu komunikis pri la ŝanĝo.

En tre mallonga tempo ni sukcesis rekontakti kun la membraro kaj jam baldaŭ komencis alflui la kotizoj. Jam en novembro ni sukcesis reaperigi S-ulon, kiu poste ĝis majo 1940 regule aperis ĉiumonate en eldonkvanto de proks. 7000 ekzempleroj.

En la kadro de niaj klopodoj kiom eble plej baldaŭ normale funkciigi la organizan aparaton ni decidis daŭrigi la eldonadon de romanoj en kunlaboro kun F. L. E. Aperis en tiu tempo la verkoj „La Lanternisto“, „Judoj sen mono“, „La batalo de l' vivo“ kaj „La vojoj estas nekonataj“, kies eldono, malgraŭ la milito, fariĝis granda sukceso.

Ĉar aranĝo de kongreso ja ne estis ebla ni okazigis referendumon per kiu la membraro povis aprobi aŭ malaprobi la kandidatojn, kiujn proponis la Roterdama SAT-rondo kiel membrojn de la nova P.K. Ili estis la k-doĵ B. Wels, C. van Essen, A. v. d. Pols, F. H. Koppenjan, A. Vollegraaf kaj k-ino E. Prent-Moon. Neniu malaprobo envenis.

La diversaj taskoj en la komitato estis jene dividitaj: B. Wels, redakto de S-ulo kaj prezido de la kunveno; C. v. Essen, korespondado, administrado de la membraro, gazeto kaj libroservo; A. v. d. Pols, financoj.

Ekzaktajn ciferojn pri financoj kaj membronombro ni ne plu havas, sed ni povas diri, ke malgraŭ la tre malfavoraj cirkonstancoj ni ĉiufanke sukcesis. La membronombro konstante kreskis, la gazeto regule aperis kaj la librovendado floris.

Ĝis en majo 1940 la milito trafis ankaŭ Nederlandon kaj malebligis ĉiun aktivecon! Jam antaŭe ni korespondis kun la peranto en Argentinio kaj en aprilo 1940 ni sendis al Buenos Aires kopion de nia membrarlisto kun instrukcio kiel agi se Nederlando trafiĝos en la militon. Por ne endanĝerigi niajn membrojn ni detruis la membroadministradon kaj parton de la arĥivoj; la monon kaj la librostokon ni sukcesis savi tra la bombardoj kaj teroro.

C. v. E.

PLENŬM-KOMITATO

Kiel jam dirite, la P.K. de S.A.T. konsistas el Kdoĵ Andreo, Bannier, Glodo, Mejer, Piron. — Kdo Dazun eksciĝis en decembro 1946, pro la pezo de lia posteno ĉe la franclingva L.E.A., SAT-Amikaro.

Principe la P.K. kunvenas ĉiumonate, — pli ofte se necesas. Fakte, ekster tiuj kunvenoj, la P.K.anoj renkontiĝas ĉiusabate ĉe la SATEjo.

Pro motivoj facile kompreneblaj, la artikolo 11 de la Statuto ne estis aplikata; sed venontjare, kiaj ajn estu la cirkonstancoj, ni reguligos la pozicion de la P.K.

GENERALA KONSILANTARO

Pro la samaj kaŭzoj ne funkciis la Ĝ.K. deposed 1939. Ni ĵus entreprenis korespondadon kun la iamaj Ĝ.K.anoj cele al revivigo de tiu instanco.

S.A.T.-OFICEJO

Ĝis novembro 1945 K-do Bannier tenis preskaŭ sole la sekretariadon; li oferis la tutan tempon kiun lasis lia panakira profesio..... tre ofte pli! Tiam ni dungis K-inon Marcela, kiu deĵoris nur kvar horojn potage; ŝi malsaniĝis en novembro 1946, ĝuste kiam alluis la kotizoj; laciĝa vintro por K-do Bannier, kiu portis preskaŭ la tutan ŝarĝon. — En marto 1947 ni dungis K-don Kotro; li deĵoras konstante, sub la gvido de Bannier kiu, malgraŭ tio neniel reduktis sian penadon por SAT!

De monato al monato pliiĝas la laboro ĉe SAT; jam nun K-doĵ Bannier k Kotro ne sufiĉas; multaj taskoj fendaj estas ellasitaj pro manko de..... brakoj k tiu manko estus ankoraŭ pli profunda se, en Roterdamo, K-doĵ C. v. Essen, Vollegraaf, k.a. ne prizorgus la etiketojn por nederlando k la ekspedon por ĉiuj landoj. Tiu riesufiĉo koncernas la propagadon (ekspedo de specimenoj al adresoj ĉerpitaj el esperantaj gazetoj), kiel la eldonojn (selekto, kribo, korekto de manuskriptoj), kiel ankaŭ la administradon (starigo de metoda kontado, kiel ĝi ekzistis ĝis 1939). Nekredebla la nombro de leteroj, kiuj venas ĉe SAT! Ĉiutage 8—10 respondojn, foje longajn. Plimultiĝas precipe la poŝtaĵoj el Germanio k Aŭstrio; la tieuloj soifas je kontakto kun la esperantista „ekstero“, por ili malpermesita deposed pli ol dek jaroj! Kaj baldaŭ aldoniĝos la vendo k ekspedo de la Plena Vortaro, de Kandid, de Leteroj, de Zamenhof, ktp.....

L.E.A.-KOMITATO

K-do Piron, Paris, kiel reprezentanto de la P.K. estas prezidanto de la L.E.A.-Komitato. — Sekretario K-do W. F. Krut, Vier Heemskinderenstr. 53-3, Amsterdam W. — Ĝis nun 3 cirkuleroj estis sendataj al la anoj de la Komitato.

GÖTEBORG A KONVENCIO

La P.K. opinias ke la Konvencio estas pli necesa ol iam ajn. Por la bona funkciado de la L.E.A.-Komitato, la respektivaj taskoj de SAT k de la L.E.A.oj, devas esti klare difinitaj k ambaŭflanke aplikataj amike k bonvole.

En 1946 la franclingvia L.E.A., SAT-Amikaro, akceptis la Konvencion.

REDAKCIO

Komence de majo, K-doĵ Bas Wels k C. v. Essen venis al Paris por kontakti kun la P.K.anoj. Dum tiu renkontiĝo montriĝis ke ĉe niaj du Roterdamaj K-doĵ la pensoj k planoj pri la estonto de la Asocio tute similas al tiuj de la P.K.

(daŭrigo sur paĝo 4)

PROPONOJ AL LA S. A. T.-KONGRESO EN AARHUS

Prezentitaj de

W. F. Kruit, A. F. van Haren,
C. van Essen kaj Bas Wels.

I. La kongreso de SAT decidas komisi al la plenum-Komitato subteni la klopodojn por fondi „Internacia Centra Komitato” kiu, ne enrudante sin en la internan vivon de la diversaj asocioj kaj ne endanĝerigante la organizan kaj ideologian liberecon de la apartaj grupigoj, okupu sin pri tiuj taskoj kaj entreprenoj, kiuj posedas komunan gravecon por ĉiuj esperantistoj, sendepende de ilia politika aŭ religia starpunkto.

II. La kongreso de SAT, konsiderante, ke SAT kiel supertendenco, klasbatala kaj emancipa asocio esperantista prezentas fidindan kaj elprovitam bazon por la PER-esperantista agado de ĉiuj esperantistoj, adeptantaj ian socialistan tendencan, alvokas ĉiujn unuopajn socialiste-cajn esperantistojn individue aliĝi al SAT kaj alvokas ĉiujn laboristajn kaj kontraŭ-kapitalistajn esperanto-asociojn aliĝi al la LEA-Komitato de SAT kaj akcepti la Gotenborgan-Konvencion.

III. La kongreso de SAT, konsiderante, ke la demando pri ekzisto aŭ neekzisto de la persona dio ne estas science aŭ filozofie decidita kaj opiniante ke ĉiu membro de SAT devas por si mem decidi pri tiu ĉi demando, deklaras, ke la Statuto de SAT neniel malpermesas aŭ malebligas la aliĝon de personoj pro ilia privata kredo aŭ nekredo, se tiuj konsentas lojale observi la supertendencan kaj kontraŭ-kapitalistan starpunkton de SAT.

IV. La kongreso de SAT, opiniante, ke la laboroj de LEA-Komitato de SAT posedas multan utilon por la kunagado de la diversaj LEA-oj kaj por la internacia POR-laboro, konfirmas sian antaŭmilitan decidon pri starigo de LEA-Komitato kaj aprobas la helpon de la Plenum-Komitato por la restarigo kaj refunkciigo de la LEA-Komitato.

Propono de de Bruin

La 20a kongreso de SAT, opiniante, ke por diversaj celoj (klopodoj ĉe oficialaj instancoj, enkonduko de Esp.o en la lernejoj, aplikado de Esp.o en la scienco, aranĝo de statistiko kaj bibliografio, ktp.) tutmonda instanco reprezentanta la tutan esperanto-movadon estas necesega, petas la Plenum-Komitato kunlabori al la efektiviĝo de tia instanco kaj partopreni en ĝiaj laboroj.

G. P. DE BRUIN,
SATano 670.

Motivigo.

Kvankam ni, SATanoj, por la sukceso de Esp.o en laboristaj rondoj apartan, memstaran organizadon de lab. esp-istoj en lokaj, landaj kaj tutmonda organizoj opinias necesa, tio — laŭ ni — tamen ne signifas, ke ni por celoj lingvaj, propagandaj kaj movadoj, ne volas kunlabori kun altitendencaj kaj sentendencaj (neŭtralaj) esperantistoj.

Estas fakto, ke ni ĝis nun, ne multe

okupis nin pri aferoj, kiuj koncernas la tutan movadon, sed ĉu ni agis prave? Ni ja ne devas esti sekto, kiu laboras nur sur limigita propra kampo, apartigite de la cetera esperantistaro. Estas ja multaj aferoj ekster nia propra laborista movado, kiuj estas gravaj por ni.

Ni ĝis nun tute ne partoprenis en la agadon de la Lingva Komitato kaj Akademio. Kompreneble ne temas pri reprezentado de grupoj aŭ tendencoj en niaj lingvaj institucioj, sed ĉar ankaŭ en niaj vicoj troviĝas lingvo-spertuloj kaj ĉar ni ne povas aprobi la neagadon de tiuj institucioj, estas dezirinde ke ankaŭ ni povu influi ilian konsiston kaj agadon. Klopodoj ĉe oficialaj instancoj, ĉe internaciaj organizoj por la enkonduko de Esp.o ĉe la instruo, por aplikado de Esp.o en la scienco, ktp. estas gravaj ankaŭ por ni. Ĉu ili ne efikas pli multe, se ilin entreprenos la tuta esperantistaro? La forto de la tuta movado se ĝuste kaj bontaktike aplikata efikas pli ol tiu de unu el ĝiaj partoj.

Ĉe nia propagando utilas al ni ankaŭ sukcesoj de Esp.o sur nelaborista kampo. Atingaĵoj kiel la esperanto-poŝtmarkoj, reklamiloj de foiroj kaj komercistoj, gvidiloj fremdultrafikaj, ktp. servas ankaŭ al la disvastigo de Esp.o ĉe la laboristoj. Kial do ni ne kunlaboru — sen malutilo por nia propra afero — ankaŭ sur ĉi tiu kampo, por pligrandigi la tiurilatajn sukcesojn?

Oni do komprenu bone; ni ne deziras deflankigon de niaj ĝisnunaj principoj; temas nur pri utiligo de ĉiuj ebloj por progresigo de nia lingvo kaj la plifortigo de nia movado.

Rimarkoj de la P.K. de S.A.T.

La kongrespropono de K-do de BRUIN entenas du ĝis nun malsimilajn punktojn. Unu rilatas la propagadon, la alia la praktikon.

1) - Klopodoj ĉe oficialaj instancoj, Enkonduko de Esp-o en la lernejoj: estas pure propagandaj aferoj.

2) - Aplikado de Esperanto en la scienco rilatas al la praktikado de Esperanto.

Laŭ la spirito de la statuto de S.A.T. k de la Goteborga Konvencio, la punkto unua rilatas al taskoj rezervataj al la L.E.A. oĵ k al la L.E.A.-Komitato, ĵako de S.A.T.

Pri punkto 2. Kvankam SAT celas nun al la utiligo de Esp-o por la interesoj de la laborista klaso, la P.K. opinias ke ĝi povas tamen kunlabori kun monda instanco por la plenumo de tiaj laboroj k similaj.

Tiu instanco ekzistas, jam de post 1905 t.e. la Lingva Komitato k ĝia Akademio. Necesas nur kompletigi tiujn instancojn, laŭ la projekto farita de D-ro Zamenhof en 1905, projekto provizore forlasita de Zamenhof por komplezi al la francaj naciemaj Esperantistoj k samtempe konservi la unuecon en la movado.

La P.K. opinias ke por kompletigi la ĉefan instancan de Esperanto necesas aldoni al ĝi du fakojn:

a) LITERATURA KOMITATO, kies taskoj estos:

1. zorgi pri la pureco de la lingvo en la

eldonataj verkoj,

2. prizorgi la statistikojn k bibliografiojn,
3. rekomendi k konsili al la verkmuldoj k.t.p.

Tiu komitato povas esti kreata per la kunfandigo de la komitatoj jam funkciantaj en nacia kadro.

b) EKZAMENA KOMITATO, kreota ankaŭ per la kunigo de la naciaj organismoj en tutmonda unuo.

Unuvorte, krei nenion novan, sed vivigi, unuecigi, sennaciecigi tion, kio jam ekzistas naciece.

La P.K. de S.A.T. pretas labori laŭ direktivoj, kiuj respektos la mondan k Sennaciecan karakteron, kiun havas nia asocio de ĝia fondiĝo.

Se reformoj estas nepraj en la Esperantista movado, ili estu enkondukitaj laŭ racia k serioza plano, — ne aspekti kiel reformoj momentaj. Nia movado posedu mondajn instancojn, kies decidoj aŭ konsiloj povas esti akceptataj de la tuta esperantistaro. Alie! ne necesas ŝangi ion.

PRI INSULTVORTOJ.

El Bielefeld (Germanio) ni ricevis jenan leteron.

Tre estimata samideano!

En la Sennaciulo No. 3 - 1947 mi trovas sub paĝo 2 jenan frazon:

„..... Malamo al la boŝoj parolas pli laŭte ol saĝo.....”

Kaj kiel rimarko de l'Red.: „.....france „boches”: fi-vorto uzata de francoj (ne ĉiuj) por nomi la germanojn sendistinge. Tiu termino celas esprimi la plej aĉajn ecojn k kapablojn de homoj.

Versajne germanoj uzas analogan epiteton pri la francoj!”

Por korekti ĉi tiun eraron, mi povas certigi vin, ke en la germana lingvo analoge epiteto ne ekzistas por niaj francaj najbaroj. Dum la unua mondmilito mi estis kiel soldato en Francio. Neniam mi aŭdis kompareblan esprimon. Kaj la kaŭzo? Nu, nek mi, nek miaj kamaradoj konis malamon kontraŭ la francoj. La germana popolo ĝenerale ne emas je malamo kaj pro tio ne sentis la bezonon krei tian epiteton. Er mia nacilingvo mi konas nur unu kompareblan esprimon por unu popolo: la poloj. T.e. en nia lingvo „Polak” anstataŭ „Pole”, Esperante „polako”. Escepte de tiu esprimo, mi konas nenion alian.

Eble vi ĝustigos la eraron en la Sennaciulo.

Ciam samideane via

D-ro ERNST HAPPE.

Samideano Happe permesu al ni unu rimarkigon. Estas fakto, ke unu popolo estas pli insultema ol la alia, sed tiu insultemo ne estas kriterio pri la amplekso de la malamo al alia popolo. Cetere povas esti, ke la Francoj havas pli da motivoj insulti (k eble malami) la Germanojn ol estas inverse. Samideano Happe pripensu tion, nur por eviti ke estigos ĉe li la ideo, ke la Germanoj estas pli bonaj ol la aliaj. (Red. B. W.).

(daurigo de paĝo 2)

Restas tamen la diabla distanco inter Parizo kaj Roterdamo: tio ĝenas la rilatojn; ekzemple ne eblas al la P.K. publikigi urĝan komunikon de S-ULO, ĉar devas esti en Roterdamo, jam la 15-an tagon de l'monato, la teksto de la numero aperonta en la sekvonta numero. La konsekvenco de tiu regulo estas ke teksto atinginta la P.K. post la 10-a ne povos aperi en la numero de la sekvonta monato, precipe se temas pri artikolo, kiu nepriĝas konsulton al la membroj de la P.K. — Tion oni bone notu por eviti postulojn neplenumebajn aŭ protestojn vanajn.

Eldonoj

Pro la motivoj jam skizitaj en la Enkonduko de tiu ĉi Raporto, nia eldonkapablo estas ege bremsata; en pluraj landoj ni akumulis kapitalon, sed ni ne rajtas ĝin eksporti; k ankaŭ okazis ke, kie ni havas monon, tie ne eblas trovi paperon, aŭ inverse.

Tamen ni ne restis inertaj; spite grandajn malfacilojn ni faris, dum tiu jaro, paŝojn pozitivajn:

Plena vortaro:

A) **dua eldono:** la lastajn ekzemplerojn ni vendis en 1945. En januaro 1946 ni kontraktis kun firmo en Meksiko, por reprodukti la libron per la Ofset-(foto)-procedo. Ni ekspedis por la fotado du ekzemplerojn, kiuj estis al ni..... resenditaj de la poŝto post 6 monatoj.

En julio 1946 ni rompis kun la Meksika presejo, ĉar intertempe nederlanda SAT-ano, profesia eldonisto, propramove sin proponis por entrepreni la aferon. Ni do allasis al li ĉian liberon por kontrakti kun nederlanda firmo. En decembro 1946 li havigis al ni provaĵojn de ĉiuj folioj fotitaj. La libron oni promesis por januaro, poste por februaro, k tiel..... ĝis junio. Diversaj estas la motivoj de la sinsekvaj prokrastoj; nun, komence de junio, kulpas la bindisto, kiu tamen promesis akceli la laboron.

Tiu eldono kaŭzis al ni multe da ĝenoj k penadoj; nekredeble kiomfoje ni devis respondi al protestantaj mendintoj. Tiu sperto estu rebato al la K-doj kiuj, senpripense, miras pri la „malvigleco“ de SAT en eldonoj, k kiuj inkludas konkludi ke rutino k inertece regas ĉe la SAT-oficejo.

Ni do bedaŭre ne povas ankoraŭ fiksi la aperadon, k per cirkulero ni informos la mendintojn.

Dume mankas al la nova generacio de esperantistoj tiu verko nepre necesa por funde posedi la lingvon; plie suferas la reputacio k la interesoj financaj de la Asocio.

B) **tria eldono:** iniciatita de Kdo Lanti, ĝi estos ilustrita k ĉirkaŭ 1.000-paĝa! Ĝin preparas Profesoro Varingien, helpata de kolektiveto de fakuloj, kies lingvokono k kompetento estas elprovitaj, ĉiu en difinita branĉo. La verkado de tiu manuskripto estas laborego el granda apenaŭ pensebla por laiko. Pasos ankoraŭ monatoj ĝis kiam komenciĝos la kompostado;

Kandid (de Volter, traduko de Lanti): ni ĵus mendis en Britio, Ofset-reproduktion de tiu klasika libro, kies unua eldono tiel

rapide vendiĝis, dank'al la famo de la aŭtoro, k al la kvalito de ties traduko.

Leteroj de Zamenhof: prof. Varingien, ĝuas la feliĉon teni kolekton de tre valoraj leteroj de Z., kiuj rilatas al la tiel nomate franca periodo. Tiu trezoro de Z-ajoj, estos certe bonakceptata de la tuta esperantistaro, la maljunaj kiel la junaj. Riciĝos la kolekton k faciligos ties legadon la komentoj k rimarkoj de Varingien. Ĝi presiĝas ankaŭ en Britio.

Roza Luksemburg (de H. Roland Holst) ni projektas la eldonon de tiu fama libro. La tradukojn de Kdo Bas Wels ni legas.

Jarlibro: la unuan parton de la manuskripto ni sendis al la presejo, en Britio, komence de aprilo, — la duan parton (Adresaro) nur ĉirkaŭ la mezo de majo. Peza laboro: ĵus antaŭ la ektaĵo, venis samtempe 700 adresoj el Germanio; tio ege komplikis la preparadon. Ni esperas ke ĝi estos preta antaŭ la kongreso. Ĝi entenos la adresojn de ĉiuj membroj, — escepte de kelkaj kiuj petis la nepublikigon. Ĝin ricevos, el Britio, ĉiuj SATanoj pagintaj la 1947-kotizon.

Insignoj: elkerpiĝis nia provizo. Ni provis mendi en Ĉekoslovakio, sed la prezoj estas ankoraŭ pli altaj ol en Francio. Ni do decidis mendi en Germanio por uzi la tiean kapitalon.

Rilatoj kun Sovetio

Iu SATano kvazaŭ kulpigis nin pro tio, ke ne eblas al la Esperantistaro korespondi kun Sovetio! Ĉu utilas defendi nin kontraŭ tiu facilanima akuzo? ni ne kredas. Tiu K-do tro taksas la povon k la influon de nia Asocio! Ni ankaŭ ŝatus re-rilati kun niaj sovetiaj K-doj, k nedubeble tiuj ĉi havas la saman deziron; tion pravas la letero, el Tula, kiun publikigis Heroldo de Esperanto en sia numero de la 1. majo 1947. — Ĉu la kritikanto mem provis korespondi kun siaj iamaj amikoj en Sovetio? La vero estas ke la Plenum-Komitato de S.A.T. skribis al la sovetia Ambasadoro en Paris, por atingi ke niaj membroj rajtu korespondi, sed ĝis hodiaŭ la Ambasadoro ne respondis!!

Sennacieca Solidar - Servo

Ĝi celas helpi al la malsatantaj SAT-anoj en Centra Eŭropo, sed ne estas permesate ekspedi al tiuj landoj pakojn super unu kilogramo, eĉ nenion al Germanio. Sekve ni devis uzi vojojn malrektajn, nome la komplezemon de francaj aŭ usona SAT-anoj, kiuj deĵoras ĉu profesie ĉu soldate en Germanio k en Aŭstrio.

Krome, en la okcident-eŭropaj landoj la nutraj-artikloj ne abundas, k estas tre malfacile fari pakojn kun plenuita enhavo.

Tial en februaro 1947 ni komisiis SAT-anon **Ralph . Bonesper** (461 West 44th Street, Apt. 5.D., New York-18, N.Y.) por kontakti kun la fama firmo C.A.R.E., kiu prizorgas la liveron, en la plej bonaj kondiĉoj, de pakegoj da nutraĵo en Germanio (escepte en la sovetia zono kiu ne akceptas la importon de tiuj pakoj) en Aŭstrio ktp.....

La enhavo de ĉiu pakajo valoras 20 dol., tamen kostas nur 10 dol. Ĝia livero

estas garantiata.

Ĝis la 23 de majo 28 pakoj estis ekspezitaj al SATanoj aŭstriaj k germaniaj. Pliiĝos la amplekso k akceliĝos la ritmo de la ekspedoj.

Tiu solidarkaso estas subtenata per donacoj el ĉiuj landoj; neniel ĝenas la malpermeso ĝiri monon al Usono. Ĉe niaj usona, argentina, brazilia perantoj alfluas la kotizoj k la libropagoj; tiun monon ni simple disponigas al la servo Bonesper; la SATcentro (Parizo) reakiras tiun elspozon per la donacoj kiuj fluas ĉu al Parizo-Roterdamo, ĉu al la landaj perantoj en Eŭropo.

Per speciala cirkulero ni vokis al la SATanoj en Ameriko, norda k suda. Ĝis la 23. de majo (do post tempo relative mallonga) Bonesper ricevis jenajn donacojn: K-do Mark Starr 20 dol., — Bonesper 10, — Th. Weder 5, — H. G. Schatz 5, — G. Gabor 5, — S. Hardis 1, — Falgier 5, — Asoc. Esp. de Rio de Jan. 7, — Dormont 5. — entute 63 dol. Krome Th. Weder deponis ĉe Bonesper 25 dol. kiel pagon por estontaj mendoj de libroj.

En Parizo, de post la 15 februaro 1947 (ni viŝas la antaŭan periodon) ni enspezis 1.425 ff, al kio aldoniĝas 1.070 ff, la saldo de la Servo, kiun prizorgis Kdo Petro Jayer, ĝis antaŭ nelonge, en la kadro de SAT-Amikaro. Por senbalastigi la kolonojn de Sennaciulo, la Bulteno de la franca LEA „SAT-Amikaro“ konsentis publikigi la nomojn de la francaj donacintoj.

Niaj vokoj en S-ULO instigis K-dojn en Svedio, Danio, Nederlando, Britio, Usono al sama bonfaro privata.

Ni akcentas pri la karaktero de nia Solidarkaso: ĝi estas absolute sennacieca; ĝi pretas, laŭ sia povo, helpi al ĉiuj malsatantoj, kia ajn estu ilia nacieco, — sub la sola kondiĉo ke ilia ideologio ne kontraŭu la principojn de SAT.

P.K. de S.A.T.

Frakcioj en S.A.T.

PACISTAJ K-doj, atentu!

Ĉe l'Aarhus'a Kongreso estos finaragata la Pacista frakcio en S.A.T., jam prilaborita dum la Kopenhaga-1939, kie kolektiĝis pli ol 60 aliĝoj diverslandaj.

K-do **Rofo**, komisiita tiurilate de S.A.T.: Amikara P.F., insiste petas tiujn aliĝintojn k ankaŭ la ceterajn K-dojn, kiuj eksentas intereson pri la temo, bonvoli denove sin turni al li kun listoj da aprobantoj, sugestoj k raportetoj pri la paca movado en la respektivaj landoj.

La adreso estas: **Rofo**, Villa Georges, Pierrefitte, (H.P.) Francio.

ATENTU!

Pro libertempo de niaj kuntablorantoj **SENNACIULO** ne aperos en aŭgusto. Kompense vi ricevos pli ampleksan septembran numeron.

DE CARA REGNO AL SOVET-UNIO

II.

Ni jam diris, ke Sovetio en la unuaj kvin jaroj de sia ekzisto devis plenumi gigantan batalon eksteren k internen. La konstanta danĝero donis al la politiko tre radikalan karakteron. La ŝtato estis la posedanto de la produktoj k de la tero: la agrikulturaj produktoj do devis esti liverataj kontraŭ fiksitaj prezoj al la ŝtato, kiu plenumis la distribuadon de ili. La internacia komerco — nun tre malgrava — tute transiris al la ŝtataj organoj. Sed la terkulturistoj ribeladis kontraŭ tiu deviga vendo al la ŝtato k intence tenis la rikolton malgranda. Krom tio la ŝanĝo de la grandbienoj al memstaraj bienetoj kaŭzis per si mem jam gravan reduktion de l' produktaro. En la urboj k ekster ia terkulturaj regionoj oni terure malsatis.

Lenin komprenis, ke estas necese anstataŭigi la „militkomunismom per metodo, kiu per pli longa k malpli rekta vojo kondukas al la alsciigo de l' produktoj. En 1922 la libera merkato restariĝis k tiel la agrikulturo k la industrio ekhavis du sistemojn: la komunisma-kolektiva k la kapitalisma. La ŝtatan adproprigon de la terproduktoj oni anstataŭigis per imposto naturafa; kion la terkulturisto rikoltas krom tio li rajtas vendi sur la libera merkato. La agrikulturaj entreprenistoj, la „kulakoj“, ree fariĝis grava faktoro, kvankam oni povis moderigi ilin per punoj k ekzilo. Flanke de tio la kolektivaj agrikulturaj entreprenoj (Kolhozoj) k la ŝtataj (sovhozoj) daŭrigis la funkciadon k plivastiĝadis per la komunisma propagando. Tiu periodo de la N.E.P. daŭris ĝis 1927. Post tio oni rapide likvidis la tutan kulakaron: en 1931 pli ol la duono el la 12.800.000 rusaj agrikulturaj entreprenoj estis jam unuigitaj je kolhozoj. Pro la meĥanikigo la agrikultura produktaro daŭre kreskis, tiel ke oni nur malmulte bezonis la sistemon „kapitalisman“.

Post la morto de Lenin (1924) du tendencoj en la rusa komunismo komencis la finbatalon pri la potenco: Stalin ĉe la unua, Trocki ĉe la alia flanko. La unua ne kredis pri baldaŭa mondrevolucio; Stalin do celis al la konstruo de nacia komunismo. Sed Trocki opiniis, ke mondrevolucio nepre necesas por la kreado de aŭtentika komunismo en Sovetio; izolita la komunismo degenerus en ŝtatan hegemonion k burokratismon, k krome la nacio ne povus sukcese defendi sin kontraŭ eventuala atako de la komunaj kapitalismaj grandpotencoj. Kompreneble ekzistis pli da opini-diferencoj inter ambaŭ viroj.

Trocki perdis tiun batalon kontraŭ Stalin: unue oni ekzilis lin al Alma Ata en Centra Azio, post tio li vagadis tra la mondo k troviĝis daŭre en vivdanĝero. En Meksikio liaj malamikoj fine sukcesis murdi lin (1940). Sed konstante liaj k similaj ideoj reaparis ĉe aliaj gvidantoj de la Unio kun la rezulto, ke sekvis multaj ekziloj k ekzekutoj. (Zinovjev, Kamenev, aŭgusto '36; Radek, Sokolnikov, januaro '37, k aliaj).

En 1927 Stalin povis komenci la aplikadon de siaj ideoj koncerne la konstruon de ekonomie k milite forta sovet-ŝtato. Komenciĝis la periodo de la kvinjarplanoj (1927—1937), kiu estis tre interesa.

Rilatoj kun eksterlando post la oktobra revolucio de 1917 apenaŭ ekzistis. Precipe la franca burĝaro suferis grandan malprofiton, tial ke la Rusoj ignoris la carajn ŝtatsuldojn. La alianco de la Kaukaziaj petrolfontoj — sen ajna kompenso — rezultigis la malamikecon de la potenco „Shell“, kies ĉefo estis Henri Deterding. Nur du aliaj izolitaj ŝtatoj baldaŭ serĉis kontakton kun Moskvo: Germanio k Turkio. Estis Rathenau, kiu kun la Rusoj faris la traktaton de Rapallo (1922); nur iom poste sekvis la faŝista Italio kun komerca kontrakto; Kemal Paŝa estis la tria en la vico. Sed tiu subteno malmulte helpis al Sovetio, kiam ĝi intencis modernigi sian agrikulturon k do bezonis multajn maŝinojn. Por tio Stalin bezonis eksterlandan kapitalon k eksterlandajn teknikistojn. Li do serĉis kontakton kun la Okcidento k unue sukcesis ĉe la ministro Mac Donald de 1924, kun kiu li faris komercan traktaton. En 1928 li subskribis la Kellogg-pakton, estis agnoskata de Usono kun celo averta al la adreso de Japanio, aliĝis en 1934 al la Ligo de l' Nacioj k aranĝis unu jaron poste defendan interligon kun Francio. Tamen la eksterlanda financa helpo al Sovetio ne estis multe grava: per la eksporto de greno k petrolo Sovetio devis pagi k tio estis tre malfacila precepte post 1929, kiam la agrikulturaj produktoj daŭre malplivaloriĝis. La Rusa proletaro pro tio duoble suferis: ĝi devis laboregi por pligrandigi la produktaparaton k ĝia vivnivelo restis terure malalta. Al la disvolvigo de la trafikreto, de la minoj k fabrikoj oni devis oferi la unuajn fruktojn de l' evoluinta produktado.

Rusio posedis en 1913 pli ol 11 milionojn da industriaj laboristoj; en 1936 la nombro estis 25,8 milionoj. En industriaj grand-entreprenoj laboradis en 1913 preskaŭ 2,8 milionoj da laboristoj, en 1936 7,7 milionoj. Krom tio oni sukcesis ĉe la fino de tiu periodo transloki la fokuson de la rusaj bazo-industrioj al la Uralo, malproksime de la nesekuraj limoj okcidentaj, k eĉ neatingebla por aviadiloj. Tiel Sovetio povis elteni la invadon de junio 1941; la perdo de tuta Ukrainio ne povis perturbi la rusan militaparaton, ĉar ĉe la Azia limo ĝi restis la posedanto de netuŝebla bastiono. K tiel la glora venko de Stalingrado povis iĝi kvazaŭ la turnpunkto en la dua mondmilito. (Daŭrigota) A. Pl.

LA EKONOMIA SITUACIO EN BRITIO

La nuna ekonomia stato de Britio estas malfacila. De 1939—1945, la britoj devis subigi ĉion al la celita venko en la milito; normalaj eksportoj ĉesis; k eĉ necesiĝis vendi ĉiujn akciojn ktp. tenatajn eksterlande, por helpi pagi la militkostojn. Antaŭ la milito, la procentaĵo, ricevita per

NI REKOMENDAS!

La jenajn librojn ni forte rekomendas al vi, ĉar ili havas multajn bonajn kvalitojn. La lingvo estas modela, la enhavo tre interesa, la aspekto bela k la prezo por la nuna tempo ridinde malalta. Vi nun menuu k la grupoj pligrandigu sian stokon. Ne forgesu, ke ni bezonas monon por eldoni novajn verkojn.

LA SENLINGVULO de V. Kolenko. El la Rusa lingvo modele tradukis M. Sidlovskaja. Interesa romano pri la aventuroj de Rusa kamparano, kiu forlasis sian landon por serĉi sian feliĉon en Amerikon. Nur bindita havebla. 2.90 gld. aŭ 135 fr. 212 paĝoj.

FONTAMARA de J. Silone. Temas pri la faŝismo en Italio k la maniero per kiu Silone scias vekti nian scivolon, estas majstra. Bindita 2.90 gld. aŭ 135 fr. Broŝurita 2.50 gld. aŭ 115 fr.

HOMOJ EN MILITO de Andreas Latsko. Tradukis Karlo Minor. La libro konsistas el diversaj apartaj rakontoj el la milito. Latsko estas granda artisto k Minor sperta esportisto. Havebla bindita (2.90 gld. 135 fr.) aŭ broŝurita (2.50 gld. 115 fr.) Ĉiuj prezoj plus afranko.

Menuu ankoraŭ hodiaŭ ĉe SAT en Parizo aŭ R-damo aŭ ĉe via landa peranto. La kvanto ne estas granda, do rapidu!

la aluditaj akcioj, ebligis importadon; nun, ĉar mankas tiu procentaĵo, multe pli da varoj devus esti eksportataj por ekvilibrigi la nacian ekonomion. La situacio eĉ pli malboniĝas pro la manko de karbo en Britio. Oni ne plu povas eksporti karbon nek produkti sufiĉon por certigi seninterrompan funkciadon de la fabrikoj.

La solvenda problemo estas: kiel pligi la produkto-kvanton de eksporteblaj komercaĵoj por kompensi la necesajn importojn.

Portempe, nutraĵo, krudaj materialoj, maŝinaro kc. estas aĉetataj pere de la monpruntoj de Usono k Kanado. Tiuj kreditoj tamen, plimalpli frue elĉerpiĝos, do, efektiva rimedo devos esti trovata; se ne, la vivnivelo de la brita popolo nepre malaltiĝos. La Laborista Registaro proponas solvi la problemon per jenaj rimedoj:

1) Alproprigo al la ŝtato de la bazaj industrioj, por ke oni povu efike reorganizi ilin. Jam de 1.1.47 la ŝtato ekposedis la minindustrion.

2) La registaro altrudos pli efikan organizadon al la ceteraj industrioj, k donos monhelpon rilate al la instalado de pli moderna maŝinaro.

3) La laboristoj laboros kiel eble plej streĉe.

4) La registaro malmobilizos el la armeo ktp plian duonmilionon da viroj, k

5) la servoj de ailandanoj estos utiligataj laŭeble.

La laborpartio staras antaŭ tre malfacila tasko. La reakcio malhelpas.

B. B. B. (18.081)

En la febr. no de „S-ulo“ k-do M. de Waard skribis tre interesan artikolon: „Ĉu esperanto estas facila?“ Ĉar li skribis multon pri kio mi samopinias, mi volonte apogos liajn vidpunktojn.

Ĉu instruisto ekscias, ke esp-o enhavas kelkajn malfacilojn por komencantoj ne konantaj aliajn fremdajn lingvojn. Ekz. oni ne facile lernas la korelativajn tabelvortojn, la diferencon inter igi k igi; sed speciale malfacila estas la akuzativo. Ĉi-lasta fakte estas la plej grava propagando kontraŭ esp-o. La lernantoj neniam komprenas, kial helplingvo, kiun oni priskribas, kiel multe pli facilan ol la naciaj lingvoj, en tiu grava punkto nepre devas esti pli malfacila. En tuta norda, okcidenta k sudokcidenta Eŭropo, en tuta Ameriko, en Aŭstralio oni havas lingvojn sen akuzativo. En tiuj lingvoj oni povas kompreni unu la alian sen uzo de akuzativo. (Oni simple metas la subjekton antaŭ la verbo k la objekton malantaŭ ĝi). Kial do esp-o nepre devas resti mezepoka lingvo en tiu rilato? Kial la laboristoj ne ribelas, kial ili toleras tian sensencaĵon? Kial la esp-revuoj estas tiel konservativaj, ke ili ne enpresas artikolojn skribitajn en senakuzativa lingvo? Mi skribis multajn artikolojn sen akuzativo — en revuoj redaktataj de mi! Mi nun demandas la redaktoron de „S-ulo“: Ĉu vi rifuzas enpresi artikolon sen akuzativo? Se li respondas „Jes“, tio signifas, ke la k-do malpli kleraj rilate al la gramatiko ne rajtas skribi en nia revuo. Kiom multaj esp-istoj lernas la uzon de la akuzativo en la frazoj: Ili elektis lin reĝo (sen -n), mi aŭdas vin sopiranta (sen -n) k „Mi aŭdas la muzikon dissendatan el Romo“ (kun -n). La kompatinda lernanto devas lerni tiajn regulojn.

Sed kompreneble la instruisto devas ribeli. Li devas diri: Esp-o estu komprenilo, ne gramatika labirinto kiel la latina lingvo. Ne estas en la intereso de la instruisto, ke kelkaj el la lernantoj rezignos pri la instruo, tial ke la reguloj de esp-o estas tro malfacilaj. Mi do simple diras al miaj lernantoj: „Tiu akuzativo estas sensencaĵo. Ni tute ne okupas nin pri ĝi. Mi skribis multajn artikolojn en senakuzativa lingvo, k tiam kiam mi partoprenas en diskutoj, ni neniam uzas la -n kaj oni tuj komprenis min.“

Mi ankaŭ tute samopinias pri la „Plena gramatiko“ de Kalote k Varingien. Fakte estas terura libro. Mi posedas detalajn gramatikojn pri angla, franca, hispana, germana k aliaj lingvoj. Kaj kvankam tiuj lingvoj estas multe pli malfacilaj ol esp-o, la gramatikoj, eĉ se ili estas por progresintoj, estas malpli ampleksaj. Por uzi „Plenan gramatikon“, oni devas lerni multajn terminojn, ekz. adjekto, epiteto, suplemento, komplemento, determinato ktp. Mi lernus multe pli da esp-o, se mi havus alian gramatikon. Ĉu ekzistas alia detala gramatiko por progresintoj? Do, donu al mi la nomon.

La plimulto de laboristoj sopiras al senklasa socio. Sed esp-o konservanta la akuzativon fakte dividas siajn adeptojn en klasojn: La „kleruloj“ kiuj komprenas

Majo 1947

La plej natura interrilato inter la tri faktoroj de la ekonomia vivo estas, ke la homo laboras por gajni monon k ke li aĉetas per la mono la ĉiutagan panon. Tio validas por ĉiuj landoj, kie la ekonomia sistemo baziĝas sur sana fundamento. Sed por Germanio la hodiaŭa situacio havas alian aspekton. Post la forigo de la malbenita reĝimo k la disfalo de Germanio en kvar zonojn la iama germana monsisistemo ruiniĝis. La mono perdis la valoron, kio klare evidentiĝas el la fakto, ke ne estas eble aĉeti ion en la eksterlando per germana mono. Interne de Germanio malaperis la centra registaro k kun ĝi institucio, kiu povus porti la ŝarĝon de la tutŝtataj ŝuldoj. Tio signifas faktan bankroton de la germana monsisistemo. Jure oni ne deklaris la bankroton. Sed ĉiu scias, ke la nuna financa situacio estas nur transa k ke la kompetentaj aŭtoritatoj planadas reformon de la monsisistemo, ke la reformoj alportos gravan senvalorigon de la mono. Sed oni ne scias nek la detalojn nek la tempon de la reformo. Nun regas haosa necerteco kun

rekte uzi la akuzativon k la granda plimulto de la epistoj, kiuj neniam lernas rekte apliki la -n, ĉar iliaj gepatraj lingvoj en tiu rilato — estas multe pli simplaj ol la tre simpla mondlingvo! La naciaj lingvoj kreas ankaŭ klasdividojn per siaj malraciaj ortografioj. Sed ni ne deziras klasojn, ni deziras, ke ĉiuj epistoj povu skribi artikolojn en la revuoj.

Ni deziras demokration. Do, for la akuzativon!

Poul Moth

